



Evoluo de revuo

La enigma de Robin Hood • Hilda Jones memoras

**4 · Stranga sekto
vira en Ĉestro**
NOEF kunvenas

**6 · Ranoj kaj
interpretistoj**
*Ian Carter
vizitas lernejon*

**7 · Ŝtormoj en
Aylesford**
*Sally Phillips
partoprenas
semajnfino*

**8 · Drondo
en Londono**
*Anna Powell
diskutroindumas*

**10 · Hilda Jones
memoras**
*sian esperantan
vicon al
Joyce Bunting*

**14 · La neverŝajna
esperantisto**
*rakonto de
Carys Goldy*

**18 · La internacia
lingvo ... inter
internaciaj
lingvoj**
*Tim Owen
prezentas
en Sheffield*

**20 · La enigmo
de Robin Hood**
*prelego de
Jack Warren*

**28 · Kriego de
sur tegmento**
*novleto de
Geoffrey Sutton*

**30 · Recenzo:
Homoj de Putin**
Paul Gubbins

31 · Traduku!
Ebrio

34 · Mistelefonado
*skeĉo de
Carys Goldy*

**36 · Insekto
tute ĉarma**
*Joyce Bunting
pri forfikuloj*

38 · Babile
Paul Gubbins

redaktis: **Paul Gubbins**

paul@gubbins.org.uk

3 Arden Court, Mossley, Congleton, Cheshire, CW12 3JH

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**

eab@esperanto.org.uk

Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE

telefone: +44 (0)1782 372141

aŭ en Britio: 0845 230 1887

fakse: 01782 372393

retejo: **esperanto.org.uk/lbe**

ISSN 0007-067X

fasonis: Ava Rowell

enpaĝigis: Simon Davies

presis: Panda Press

limdato por la aŭtuna numero:
31 aŭgusto 2015

La Brita Esperantisto kaj EAB Update estas eldonataj entute ses fojojn jare.

Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB.

Nemembroj povas aĉeti *LBE* de la EAB-libroservo en Barlastono.

Ni normale ne akceptas paperajn kontribuojn.

Kontribuoj estu sendataj elektronike kiel ODT, DOC, RTF, aŭ plata teksto.

Fotoj estu kunsendaĵoj, apartaj de la akompana teksto.

Fotoj aperintaj en *LBE* ne estu represitaj en aliaj publikaĵoj, ĉu paperaj, ĉu elektronikaj, sen permeso de la redakcio de *LBE* kaj ĉiaokaze sen fontindiko.

KUNSIDIS komence de februaro en Barlastono membroj de la administra komitato de EAB (Esperanto-Asocio de Britio).

Longis la tagordo por informiĝi pri la progreso de diversaj projektoj, kiuj iom post iom realiĝas: renovigo de la retejo, starigo de interreta lingvo-kurso, ekzemple, kiuj ne palpebrume estiĝos, ĉar ili dependas de voluntula – sed ja diligenta – kunlaborantaro. Al la koncernatoj, cetere, kiuj dediĉas sennombrajn kaj ofte sendankajn horojn al tiu ĉi projektoj, ni humile kaj sincere dankas.

Tamen elstaris el la tagordo unu afero, kiu nin ĉiujn koncernas. Aŭ ĉu? Temas pri la estonteco de la ĝis nun – kun en la lastaj jardekoj unu-du esceptoj – ĉiujara brita kongreso de Esperanto. Raportite dum la februara kunsido estis, ke aliĝis al la kongreso en Brajtono (17-a ĝis 19-a de aprilo) 30 homoj. Kompareblas tiu ĉi cifero kun tiu de la sama semajno antaŭ la pasintjara Sheffield-kongreso (kiu fine altiris ĉirkaŭ 50 kongresanojn).

Organizantoj de la ĉi-jara kongreso (la nelacigeblaj EAB-sekretario Tim Owen kaj la asocia administranto Viv O'Dunne) konsterniĝas. Ili dediĉas horojn al la kongreso: kunlaborante kun

Ĉu kongresi aŭ nekongresi?

surlokaj esperantistoj por certigi, ke pleje indas la kongresejo (kiel en Sheffield: mojose, kiel diras junuloj); por prepari kaj dissemi informilojn; por aranĝi programon kaj interrilati kun prelegontoj; por pripensi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj pritrakti aliĝilojn. Kaj dumkongrese deĵori kaj certigi, ke ĉio glatas.

Ĉio ĉi por “nur” 50 homoj. Oni povus kontraŭ pli-malpli sama laboro okazigi kongreson por 250. Tamen venas nur 50. Leviĝas la demando, kaj tion komitatanoj komencis diskuti en februaro, ĉu ankoraŭ valoras dediĉi tiom da hom- kaj mon-fortoj al evento, kiun ses seponoj de la membraro de EAB neglektas.

Verŝajne, se oni ekdebatas pri kongresoj dum kongreso, tiuj, kiuj fidele kaj regule ĉeestas – do la sepono – dirus, ke jes indas jaron post jaro okazigi tritagan kongreson kun prelegoj, diskut-rondoj, komuna manĝado, kaj simile.

Tamen estus interese scii, kion opinias la aliaj ses seponoj de la EAB-membraro. Kial vi ne ĉeestas? Kiamaniere eblus pliallogigi la programon, por ke ankaŭ vi

Stranga sekto vira en Ĉestro

ESPLORIS la polico en Ĉestro dum la semajnfino raportojn pri stranga vira sekto aktiva apud la stacidomo.

Kelnerino ĉe la hotelo Westminster, kontraŭ la stacidomo, telefonis al la polico por informi, ke ok sinjoroj, parolantaj nekonatan lingvon, luis manĝoĉambron en la hotelo kaj tie restis, dum preskaŭ kvin horoj, kaj preskaŭ senmove.

“Ili sidis en la samaj lokoj,” raportis la kelnerino, kiu pro timo preferis anonimi. “La sinjoroj, krom unu escepto ne plu junaj, sidis ĉe ortangula tablo, po du je ĉiu flanko,

kaj babilis fremdlingve. Sendube ili ion planis.

“Pro tio, ke ili nur sporade uzis la anglan, por danki, kiam ni alportis manĝaĵojn, ni taksis ilin fremduloj, eventuale teroristoj, kiuj celis saboti la ĉevalkonkursojn, kiuj samsemajfine okazis en la urbo.

“Ke temis pri teroristoj, eble el mezoriento kaj apartenantaj al Al-Kaida aŭ Islama Ŝtato, indikis al ni la manko de virinoj. Ni scias, kiel viroj en mezorientaj landoj mistraktas virinojn, ne permesante, ke ili ŝoforu, ktp.

ĉeestu? Aŭ ĉu vi opinias, ke pro unuflanke maljuniĝo de membroj kaj aliflanke la kreskanta sociforuma “virtualiĝo” de la esperanta mondo, nun superfluas tiel kunveni?

Ĉu do anstataŭe sufiĉus unutaga jarkunsido (laŭleĝe nepra) en unu el niaj relative facile alireblaj grandaj urboj, plus prelego aŭ diskutrondo, por memoriĝi, ke ni parolas la internacian lingvon?

Se la jarkunsido okazus iun sabaton, oni povus, se dezirate, semajnfinoj kaj tiel okazigi kunamikoj proprajn kunsidojn, ekskursetojn, renkontiĝojn. Aŭ ĉu ankaŭ aranĝon tian vi bojkotus, tiel

ke mankus dum la jarkunsido kvorumo?

Do jen la demando: ĉu la fino de la kutima brita Esperanto-kongreso?

Bonvolu, se vi ne estos en Brajtono, indiki al mi (paul@gubbins.org.uk), esperante aŭ angle viajn opiniojn, por ke la administra komitato estu informita pri la starpunkto de la membraro.

Aŭ ĉu per via neĉeesto en Brajtono, aŭ per via reta silento, vi vere ne interesiĝas pri britaj kongresoj? Tiel nepros konkludi, ke ĉi-landaj kongresoj, almenaŭ en la nuna formo, senvaporiĝis kontraŭ trakfina baraĵo de indiferento. ■



“De tempo al tempo aŭdiĝis de interne de la ĉambro violono-muziko, supozeble maniero komunikiĝi kun aliaj sektanoj ekster la ĉambro. Pro tio ni kontaktis la policon.”

Tamen, kiam alvenis la polico, la teroristoj jam fuĝis. Raportite estis, ke unu eskapis aŭte al Kimrujo;

du-tri aliaj trajne al aliaj partoj de Anglujo.

La polico nun serĉas la suspektatojn, fotitajn per sekretaj kameraoj en la hotelo kaj poste identigitajn danke al la dosieroj, kiujn flegas la polico pri ĉiuj, kiuj fremdlingve babilas en publikaj lokoj. ■

Supre: Eric Smith,
Brendan Marsh,
Richard Phoenix.



Maldekstre:
Peeter Aitai,
Harry Barron.

Artikolo tradukita
kun permeso
de la gazeto
Chester Chronicle
(2014-09-29).

Notindas, ke la
raporto koincidis kun

kunveno de NOEF (Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio) en la urbo.

Ranoj kaj interpretistinoj



IAN CARTER

EN DECEMBRO Ian Carter (esperante nomita Jano) vizitis londonan lernejon por paroli pri Esperanto.

Spektinte enkondukan filmeton, kiun la parolinto kreis, la lernejaninoj faris tradukekzercon "La interpretistino kaj la rano". Temis pri ŝerco, kiun la knabinoj rapide tradukis danke al ŝlosilo. La

Ian Carter prezentas la internacian lingvon al lernejaninoj de Blackheath High School, Londono.

ĉefinstruistino pri lingvo poste petis permeson vidigi la filmeton al aliaj grupoj. La teksto de la ŝerco, kun tradukŝlosilo, en formato PDF, haveblas de Esperanto House.

La filmeto mem spekteblas ĉe espinfo.org/intro-video. ■



PARTOPRENANTOJ en la aŭtuna semajnfino en Aylesford, Kent, ĝuis agrablan veteron – kaj povis trankvile promeni tra la ĉarma ĉirkaŭaĵo de la kunvenejo – malgraŭ ŝtormoj.

Ŝtormoj, ĉar jen la temo de varia kaj amuza programo. Roy Simmonds prelegis kun bildoj pri kondiĉoj por tropikaj ŝtormoj, dum Anica Page paroligis ĉiun pri ŝtormo, ĉu fakta, ĉu metafora, kiun tiu spertis. Elizabeth Stanley enkondukis la rolantojn en *La tempesto* per rakontado kaj per manfarado de ludpupoj. Terry Page daŭrigis per legigo de parto de la teatraĵo, dum ni tenis kaj montris la pupojn.

Sabaton vespere Michael Sims

ridigis per danceca prezentaĵo de *Kantado en la pluv'*, kaj ni ĝuis la filmon *Ŝtormido* el Aŭstralio kun esperantaj subtitoloj.

Krome ni gustumis frandaĵojn el Japanujo, danke al Kimie Markarian, Peter Bolwell kaj mi muzikumis, kaj Joyce Bunting rakontis pri genetika ŝanĝo por produkti plantan fiŝecan oleon. Interesa temo sed persone, por mi, incita: laŭ raporto de sciencistoj ĉe la universitato de Nottingham, ekologie kultivitaj manĝoj havas ĝenerale duoble pli da vitaminoj kaj mineraloj ol tiuj kreskigitaj per aldonaj ne-naturaj ĥemiaĵoj.

Entute, tamen, ĝinda kaj altkvalita programo en egale ĝinda loko. ■





Krome ne ĉiam eblas dediĉi tempon kaj monon al studado kaj, se necesas aldoni tranoktejon kaj manĝaĵojn, la kosto rapide kreskas.

Do kiel praktiki la lingvon, kaj buŝe komuniki kun aliaj esperantistoj, kaj kiel progresi, de komencanto ĝis progresanto, kaj de progresanto ĝis progresinto?

KIAM mi komencis lerni Esperanton antaŭ 30 jaroj, mi konis neniu, kun kiu paroli la lingvon. Ne ekzistis interreto kaj, sen praktikado, mi baldaŭ ĉesis ĝin studi. Tamen pasintjare mi decidis rekomenci.

Mi ĉeestis la someran festivalon en Shallowford, kie unuafoje mi aŭdis la parolatan lingvon. Tie mi ĝojis renkonti spertajn esperantistojn kaj pli lerni pri la lingvo, kunbabilante ekde matenmanĝo ĝis post vespermanĝo.

Sed poste? Kvin tagoj da lernado kaj parolado de la lingvo tre multe helpas, sed ne sufiĉas (eĉ en Esperanto) por atingi fluecon.

Estus bone renkontiĝi pli ofte, pli proksime, dum malpli da tempo – en la daŭro de unu tago – se eblus.

Do antaŭ nelonge, dum fin-oktobra sabato, okazis tiel nomata “drondono”: la unua “drondo”, aŭ diskut-rondo, en Londono. Ĝi komenciĝis ne tro frue por tiuj, kiuj trajnis en Londonon, do je la 11-a, kaj finiĝis ne tro malfrue je la 17-a. Dekduo da esperantistoj renkontiĝis ĉe la centra klubo de YMCA: tre konvena kaj facile trovebla loko (almenaŭ por mi), proksima al la metrostacio Tottenham Court Road. Modera kotizo de £10 ne inkluzivis



trinkaĵojn kaj manĝaĵojn, kiuj tamen surloke aĉeteblis.

Dum ses agrablaj horoj, Tim Owen afable kaj sperte gvidis viglajn diskutojn pri kvar temoj, kun paŭzoj por refreŝiĝi kaj tagmanĝi. Notoj pri la temoj diskutotaj antaŭe troviĝis - kaj ankoraŭ troviĝas - ĉe la drondona retpaĝo espinfo.org/drondono.

Bedaŭrinde mi tie trovis la horaron sed maltrafis la parton de la retpaĝo, kiu pritraktis la temojn. Ĉiaokaze mi ĉeestis precipe por aŭskulti kaj por renkonti ĉiujn, sed kun pli da preparado mi estus povinta pripensi la temojn kaj iom pli partopreni la diskutojn.

Mi rimarkis, ke kelkaj alportis notojn preparitajn - bona ideo, kaj mi same faros la venontan

fojon. Certe mi esperas, ke ripetiĝos evento tia por uzi Esperanton kaj diskuti aferojn kaj pezajn kaj malpli pezajn. Pro miaj spertoj dum la drondono mi ŝatus pli ofte tiel kunveni kaj konversacii kun esperantistoj. ■



Hilda Jones memoras

Joyce Bunting

MI NASKIĜIS en 1924 en Stoke-on-Trent. Mi eklernis Esperanton de mia avo, kiam mi havis 16 jarojn. Esperanto-libro kuŝis sur lia tablo kaj mi enrigardis. Mi studis la francan, la latinan kaj iomete la germanan en la lernejo, do rekonis plurajn vortojn. Mia avo [kiu cetere iam renkontis Zamenhof – Red.] klarigis simplan

Dum la somera festivalo pasintjara en Shallowford, Joyce Bunting parolis kun Hilda Jones, kiu festis en majo 2014 sian 90-an naskiĝdatrevenon. Poste Joyce distilis la konversacion, kvazaŭ rekte el la buŝo de Hilda. Jen la rezulto.

gramatikon, kaj mi plu lernis per koresponda kurso.

Mia unua laboro estis dum la milito kiel oficistino ĉe la ne plu ekzistanta stacidomo en Newcastle-under-Lyme. Sed mi ĉiam revis esti instruisto. Post la milito, la registaro bezonis instruistojn, kaj proponis financan subvencion por kandidatoj, kiuj daŭrigos sian edukadon por fariĝi instruistoj.

Do, mi, 22-jaraĝa, studis dum tri jaroj ĉe Dudley-kolegio. Mia patrino kaj patrinaj geavoj tre ĝojis kaj



Hilda admiras foto-ekspozicion ĉe la 50-a datreveno de la somerlernejo en 2010

subtenis min. Ili opiniis, ke edukado por ĉiuj estas grava afero.

La plej proksima Esperanto-klubo al Dudley estis en Birmingham. Mi vizitis, kaj vidis tie junan viron, silenteman, iom retiriĝeman, kaj mi ŝatis lian aspekton. Eble li estos taŭga edzo? Iom poste, mi ĉeestis britan kongreson en Bristol

alderman) en la konsilantaro de Stoke-on-Trent. Li estis vigla esperantisto, kaj ekhavis la brillan ideon inviti la Internacian Fervojistan Esperanto-Federacion (IFEF) al Stoke. Horace mem estis fervojisto dum 50 jaroj.

Stoke-on-Trent ne estas turista urbo, do mankis loĝlokoj por 300



Hilda fotita kun Arnold Pitt en Barlastono en 2010

kun mia avo, kie denove mi vidis la junan viron, Bernard, kiu estis sola. Mi parolis kun li ofte dum la kongreso, kaj post kvar monatoj ni gefianĉiĝis. Dum 55 jaroj ni estis geedzoj.

Sendube la plej bona kongreso en mia vivo okazis ĉe Stoke-on-Trent en 1963. Horace Barks estis tiutempe ĉefmagistrato (angle:

homoj. Horace devis trovi privatajn loĝejojn. Bernard kaj mi tiutempe loĝis en Stone (urbeto iom sude de Stoke). Mi petis najbarojn gastigi. Horace aranĝis kun la aŭtobusa kompanio senpagajn vojaĝojn ĉiutage inter Stone kaj Stoke.

Mi ofte parolas pri Horace Barks, ĉar li estis grava propagandisto por Esperanto kaj



Marjorie Boulton kun la Zamenhof-busto de Barbara Tribe en 2010

multe influis la lokan konsilantaron. Oni nomis lin “Mr Esperanto”. Li estis magistrato en Stoke-on-Trent dum 44 jaroj, kaj lordurbestro en 1951–52. Tio okazis, antaŭ ol li fariĝis serioza esperantisto – eble li estis tiam lernanto, ĉar li estis meminstruita.

Pro li, en 1964, nova trinkejo en la kvartalo Smallthorne ricevis la nomon *The Green Star* – esperantlingve *La Verda Stelo*. Horace volis nomi ĝin *The Esperantist*, sed la bierfarejo, la posedantoj, ne akceptis. “*The Green Star* estas pli tradicia,” oni deklaris, “simile al *White Lion* aŭ *Black Bull*.”

Horace ege fanfaronis pri la nova trinkejo: “Homoj venos de la

tuta mondo por trinki ĉe la *Verda Stelo* – el Usono, el Aŭstralio.” Danke al li, *The Green Star* staras sur Esperanto Way kaj proksime situas Zamenhof Grove.

Dum somerlernejoj en Barlastono,

studentoj kutime vizitis la *Verdan Stelon*. Ili portis

florkronon por ornami la ĉizitan stelon ekster la trinkejo, kaj eniris por tosti. Dum la vivo de Horace Barks, li ĉiam invitis al la ceremonio la lordurbestron, raportistojn kaj fotistojn de lokaj ĵurnaloj, kaj bone reklamis.

Mi klarigos pri la komenco de la somerlernejoj. La konsilantaro de Stoke-on-Trent rezoluciis, ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj en la urbo. Jam ĉe la lernejo de Queensberry Road, Jack Bagguley kaj Ken Dean instruis Esperanton kun aprobo de la ĉefo. Tamen, por tiu projekto, mankis instruistoj pri Esperanto. Do, en aŭgusto 1960, Horace Barks starigis kurson ĉe Wedgwood

Memorial College por lernigi instruistojn, kiun gvidos interalie Marjorie Boulton.

Tamen, la instruistoj malvolvis partopreni, kaj Horace sukcese persvadis nur du. La Esperanto-klubo, inkluzive de mi, aliĝis por subteni la kurson. Postan someron, Horace plenigis lokajn ĵurnalojn kaj Esperanto-gazetojn per reklamoj por la somerlernejo. Esperantistoj venis de la tuta lando, kaj de eksterlando, kaj de tiam ĝi estis tre sukcesa.

Mia edzo kaj mi estis fruaj membroj de la loka Esperanto-klubo. Bernard ĉeestis kunvenon en 1958 pri projekto fondi Esperanto-klubon. Li raportis al mi pri vigla prelego de Horace Barks kaj pri entuziasma respondo de 40 homoj. La sekvan semajnon estis mia vico (pro prizorgado de bebo) sed ĉeestis nur ok homoj. Tamen, la klubo estis fondita kun Horace, kompreneble, kiel prezidanto de la nova Nord-Stafordŝira Esperanto-klubo.

Iam en la 1960-aj jaroj, Horace persvadis la konsilantaron komisii skulptitan buston de Zamenhof fare de Barbara Tribe, lernanto de Barbara Hepworth. La klubo diskutis, kie starigi la skulptaĵon. Certe ne en la aŭtoparkumejo de la *Verda Stelo* - kiel Horace deziris - ĉar baldaŭ ĝi estus detruita de junaj huliganoj. Do ĝi trovis lokon

en la urba biblioteko. Ĝi nun kuŝas kaŝita en kelo sub la urba muzeo de Stoke.

Mi partoprenis en somerlernejo (nun somera festivalo) dum multaj jaroj pro bonkora ŝoforado de amikino Celia Mackle. En 2010, mi havis la ideon pruntopreni la buston de Zamenhof de la muzeo por la duonjarcenta datreveno de la somerlernejoj. Eble nur mi sciis, ke ĝi ankoraŭ ekzistas.

Post tikla traktado oni liveris ĝin al Barlastono. Ĝi staris dum semajno en la festoĉambro ĉe Wedgwood Memorial College, kvazaŭ honora gasto. D-ino Marjorie Boulton kaj mi estis la solaj personoj ĉe la 50-jara datreveno, kiuj ĉeestis la unuan somerlernejon en 1960.

Mi naskiĝis kaj longe vivis en urbo, sed ĉiam sopiris pri la kamparo. Mia nuna domo situas je la rando de vilaĝo Croxton, kaj ĉiutage mi vidas ĉirkaŭe la belan stafordŝiran kamparon. Mi ege amas mian ĝardenon, tamen post rompo de kokso antaŭ 11 jaroj mi malfacile promenas.

Mi estas iom maltolerema, aparte pri malŝparado en riĉaj landoj. Spite de tio, mi vivas kontente je la aĝo de 90 jaroj. Bonkoraj homoj helpas kaj ŝoforas min, eĉ al la somera festivalo en la nova kunvenejo ĉe Shallowford House. Mi estas danka. ■

ALVENAS okazo en la vivo de ĉiu viro, kiam li estas devigata meti la volon de amikino super sia propra volo. Por mi alvenis tiu okazo, kiam mi konsentis pasigi kelkajn feritagojn kun mia amatino ĉe - el ĉiaj aferoj - Esperanto-kurso.

Tio estos nova travivaĵo por ni ambaŭ, kvankam Tina jam entuziasme legis artikolojn kaj librojn priajn, kaj provis multajn fojojn instigi ankaŭ min interesiĝi pri la lingvo - sensukcese. Kial lerni artefaritan lingvon, kiun preskaŭ neniu parolas? Ne plaĉis al mi vojaĝi eksterlanden aŭ lerni fremdajn lingvojn. Mi fakte ne multe ŝatis fremdulojn, aparte tiujn, kiuj laŭ la gazetoj enŝovas sin en nian landon por ekspluati la socialan kason, al kiu perimposte kontribuas mi, kaj kiuj rifuzas lerni nian lingvon. Tamen mi ne emis esprimi sentojn tiajn al Tina.

Ĉiaokaze, ni alvenis ĉe la kursejo, agrabla malnovstila domo ĉirkaŭata de arboj portantaj belajn aŭtunajn kolorojn. Tie bonvenigis nin nia gastiganto kaj kursinstruisto per la strange militeca esprimo "Saluton", al kiu respondis Tina kun larĝa rideto de rekono, kaj mi kun pli malentuziasma ĝentileco. Mi estis iom singarda kontraŭ tio, ke oni povos varbi min

kontraŭ mia volo en la "klubon". Tamen mi vane maltrankviliĝis, kaj mi sentis nur bonvenon sen ia ajn trudemo. Tina, aliflanke, jam aliĝis al la "klubo" en la daŭro de kvin minutoj.

Ŝi vere sentis sin hejme en tiu medio, babilante esperante kun la aliaj komencantoj, ridetante, kiam oni atentigis ŝin pri eraroj, postulante respondojn al sen-nombraj demandoj, aĉetante librojn sufiĉajn por tuta vintro (eĉ kelkaj vintroj) da legado, kaj ĵetante sin plenkore en ĉiujn agadojn de la kurso. Mi rigardis kaj admiris - eĉ enviis. Tamen mia propra travivaĵo aliis. Ne por mi tia natura apartenado al la grupo, tia ĝojiga akcepto de la celoj de la esperanta movado. La etoso de la kursanoj perturbis mian komforton anglecan, kaj mi sentis min fremdulo en stranga lando.

Sed samtempe mi ne povis malhelpi, ke mi ŝatis la kurson. La gramatika konstruado de la lingvo estis sufiĉe logika kaj facile lernebla, ke ni ĉiuj - eĉ mi - baldaŭ skribadis kaj paroladis simplajn frazojn. Ni aŭskultis surbendigitajn esperantajn prelegojn el la tuta mondo - ne por kompreni la enhavon, sed por aŭdi la prononcon de spertaj parolantoj, kaj mi miris



pri la belo, la muzika ritmo de la sonoj, eĉ parolataj de la fremduloj.

Esperante ni ludis ludojn kaj kantis kantojn, ni vizitis la vastan bibliotekon: mi neniam divenis, ke troviĝas tiom da libroj tradukitaj en Esperanton, kaj eĉ verkitaj originale en tiu lingvo. Romanoj ĉiaĝenraj, dramoj, poezio, divers-fakaj studlibroj, revuoj, libroj por infanoj, komencantoj kaj lingvistoj. Ĉio ĉi certe ne estis bagatela verkaro de diletantoj. Jen kulturo kun propraj filozofio, ŝercoj, kutimoj, moroj, historio. Mi estis imponita.

Ni lernis pri la fondinto de la movado, iu Zamenhof, kiu klare estis inteligenta kaj prudenta, ankaŭ alte morala homo, kiu volis plibonigi la vivon de siaj divers-naciaj samlandanoj, kreante por ili komunan lingvon, per kiu ili ĉiuj povus kompreni unu la aliajn. Kaj oni instruis al ni iom pri la interna ideo de Esperanto: frateco, egaleco kaj justeco inter ĉiuj nacioj kaj nacioj.


Oni klarigis, kial tiuj idealoj estas atingeblaj nur per internacia lingvo kiel Esperanto. La tuto sonis ege laŭdinda.

Ĉion ĉi ni lernis de lerta instruisto en trankvila medio kun bongustaj manĝoj kaj inter kelkaj el la plej agrablaj kaj interesaj homoj, kiujn mi iam renkontis – eĉ tiuj de eksterlando. Fine de la kurso Tina feliĉe enaŭtiĝis kun 25 libroj, ses revuoj, kvar DVD-oj, la retpoŝtaj adresoj de ĉiuj en la kurso, du T-ĉemizoj, plenmano da verdstelaj insignoj kaj aliĝilo por la sekva universala kongreso. Ŝia vizaĝo brilis pro ĝojo, kvazaŭ trezorejon ŝi ĵus trovus, kaj mi sciis, ke la semajnfino plene sukcesis.

Al ŝi. Mi certe ne volis rompi ŝian gajan humoron, dirante, ke, malgraŭ tio, ke mi ŝatis la kurson, trovis agrablaj la partoprenantojn, juĝis bela kaj lerta la lingvon, kaj eĉ konsentis almenaŭ teorie kun multaj ideoj tie prezentitaj, mia koro tamen restis nemovita. Ankoraŭ fremdulojn mi ne fidis.

Ankoraŭ mi opiniis, ke la angla estas evidenta elekto kiel internacia lingvo – se ja necesus tia. Kaj maltrankviligis min tio, ke subkulturo de internaciistoj – multaj el ili fremduloj – eble multobliĝos sufiĉe por minaci la komfortan anglecon, kiu nutris kaj ŝirmis min kaj mian prafamilion dum jarcentoj. Ja, kiom ajn bona sonis la esperantista vidpunkto, tiu estis simple tro malproksima de mia. Jen fremda mondo, en kiu mi ne sentis min hejme.

Poste Tina kaj mi ne parolis pri la kurso. La vivo daŭris kun la kutimaj zorgoj kaj ĝojoj de la geedza ekzisto. Ŝi ĵetis sin plene en esperantistan vivon – kongresojn, kunvenojn, korespondajn kursojn. Mi montris nur supraĵan intereson kaj neniam malkaŝis miajn verajn sentojn. Kaj ŝi neniam demandis. Ni ambaŭ komprenis la saĝecon



diskuti nur temojn, kiuj nin kun-
igus, ne apartigus.

Kaj tiel pasis 20, 30, 40 jaroj.
Tina kreskis esperantiste kaj
persone, kaj iĝis konata kaj amata
lumo en la esperanta mondo,
prelegante, instruante, verkante.
Mia vivo, aliflanke, kondukis min
laŭ vojo de kronika depresio kaj
fine al mensa kolapso – pro
laborpremoj, oni diris, sed mi sciis,
ke temis pri io pli profunda, pri
sento de perdiĝo, senhejmeco en la
animo, pro kialoj nedefineblaj, sed
nepre trovendaj.

Tiel mi eble estus restinta en tiu
sencela duonekzisto, se ne okazis al
mi vivŝanĝa renkontiĝo. Kliento ĉe
la oficejo, kie mi laboris, esprimis
opinion pri “fiaj fremdulaĉoj”, kiun
eĉ mi trovis netolereble ksenofobia.
Lia abomeno forte frapis min, kaj
dum kelkaj tagoj mi pripensis tiun
okazon, ŝokita de la malamo kaj
nescio aŭdeblaj en lia voĉo. Sed ne
nur tio: mi vidis brutale spegulita
en liaj okuloj ankaŭ mian
ksenofobion.

Kaj venis al mi kvazaŭ-kugla
konstato, ke kiom ajn komforta,
konata estas tiu mallarĝmensa
naciisma vidpunkto, kiom ajn mi
sentas min hejme en ĝia sorĉa
brakumo, mi ne plu trovas inda tian
individuon, kiu malamas kaj
malfidas ĉion fremdan, kiu rigardas
alinacianojn kiel duarangajn
civitanojn. Mi volis meti min kiom

eble plej longe for de tiu ksenofobia
kliento, fuĝi el la domo de miaj
prapatroj, de miaj prapensoj, al
nova loĝejo, fremda, jes, sed pli
inda, pli ĝusta.

Necesis konfeso. Tina meritis
klarigon pri miaj jardekoj da
indiferento pri ŝia amata fako. Sed
kiel reagus ĉefrolanto en
Esperantujo pri la scio, ke ŝi havis
naciistan ksenofobian edzon – eĉ se
nun ne plu? Certe esperantisto
neniam povus ami naciiston kiel
min. Kiam mi informis ŝin, ŝi
dummomente silentis, tiam
respondis mallaŭte: “Mi diros al vi,
kiujn amas esperantistoj. Homojn!
Homojn ili amas, ĉiaspecajn,
ĉiapensajn, ĉiapartiajn – ne gravas.
Pri tio temas Esperanto.”

La malnova domo, kie okazis nia
unua esperanto-kurso, ne plu
staras. Anstataŭe oni tie konstruis
novan, laŭmendan kursejon, helan
kaj grandspacan. Ekstere la arboj
pluvivas, pli altaj nun, kaj burĝon-
antaj kun la verdiĝantaj folietoj de
fruprintempo. Interne, deko da
komencantaj esperantistoj diligente
studas esperantajn participojn dum
semajnfina kurso. La grupo
konsistas el tri studentinoj,
komercisto, kamionisto, profesoro
pri lingvoj, kelkaj polaj agrikulturaj
help-laborantoj, 14-jara knabo – kaj
maljuna eksnaciisto kun la ĝojo de
alhejmiĝo en la koro. ■

La internacia lingvo ... inter internaciaj lingvoj

Tim Owen

LA 16-AN de oktobro mi ricevis retmesaĝon de la ĉef-organizanto de la Festivalo pri Internaciaj Lingvoj en Sheffield, kiu demandis, ĉu denove EAB pretos kontribui al la evento. Atentemaj legantoj rimarkos, ke lastan februaron ni partoprenis la kvaran eventon, tiun por 2014. Ili eble memoros, ke mi kutime indikas, ke la organiza skipo ĉion aranĝas ene de nur kelkaj semajnoj. Ĉu do ĝi nun donis plurmonatan averton?

Nu, ne. La retmesaĝo informis, ke la festivalo ĉi-fojon okazos dum la unua parto de la universitata jaro kaj ne dum la dua. Do en 2014

okazos entute du eventoj, sed ĉiu por malsama universitato-jaro. Jen do la kutima kvar-semajna averto. EAB ja denove konsentis ne nur ĉeesti sed ankaŭ doni kvar gustum-sesiojn.

Kaj do dum la 15-a kaj 16-a de novembro mi vizitis Sheffield por prezenti Esperanton al la junaj homoj, kiuj interesiĝas pri lingvoj. Mi maltrafis la unuan sesion - la organizantoj ŝanĝis la kutiman eventejon sed min ne informis, ĉar la nova skipo ne sciis, ke en ĉiu alia jaro la sesio aliloke okazis. Kaj ĉar ili ne sukcesis starigi retejon pri la festivalo, mi ne havis la okazon legi





La devizo de Esperanto-Asocio de Britio klare videblis sube de afiŝoj kaj aliaj informiloj pri la lingvo-festivalo en Sheffield.

detalojn por konstati la ŝanĝon. Mi dubas, ĉu tio vere kostis multon al ni – la sperto en antaŭaj jaroj estas, ke preskaŭ neniu partoprenas la unuan sesion de la tago.

Al la aliaj venis kelkaj studentoj, laŭmemore 4, 5 kaj 12. Kiel kutime la plejmulto inspirigis pro sia entuziasmo, kaj mem inspiriĝis pro la facileco de lingvo, kies verbojn kaj nombrovortojn oni povas lerni ene de nur kelkaj minutoj. Kaj ne nur lingvaĵojn ili lernis, sed ankaŭ pri *Pasporta Servo*, la fonduso NoJEF, iom da historio, kaj kelkaj leĝeraĵoj.

Ili senescepte konsentis poste, ke se oni defiigus nin lerni lingvon

ene de kelkaj horoj, ŝajnus probable, ke Esperanto kondukus al pli da sukceso ol alia lingvo.

Kelkaj petis mian adreson por pli informiĝi. Mi ne estas naiva kaj jam lernis, ke, foririnte, la plimulto finfine ne kontaktos min, post kiam aliaj aferoj kaptos la atenton. Sed almenaŭ dum unu horo tiun atenton kaptis Esperanto. Ne, ili plejeble ne lernos ĝin, sed tiuj lingvo-avidaj junuloj almenaŭ scias prie multon pli ol antaŭe, ke ĝi funkcias, ke ĝi relative facilas, kaj ke ie en la mondo homoj ja uzas kaj ĝuas ĝin. Jen do rezulto, kaj jen kuraĝigilo plu subteni kaj finance kaj ĉeeste la festivalon. ■

ROBIN HOOD: angleparolanto, kun nomo facile disvastigebla tra la mondo; ikono por bonvola fripono, prirabanta riĉulojn por helpi al malriĉuloj; sufiĉe bone konata, ke indas scivoli, kial lia nomo ne staras en PIV. Se tie estas *Cindrulino*, *Donĵuano* kaj *Donkiĥoto*, kial ne ankaŭ **Robinhudo*? Ja oni parolas angle pri “robinhuda imposto”.

Sed kia estis tiu homo? Ĉu historia persono, kiel Betovenio aŭ Danto? Ĉu antaŭkristana naturspirito, kiel oni foje proponas? Aŭ ĉu precipe figuro el la distraĵ-industrio, konata el filmoj, televidsendoj aŭ kartludoj? Jen la enigmo: kiu vere estis Robin Hood?

Preskaŭ certe ne estis vera persono malantaŭ la nomo. La plej fruaj aludoj, el mezepoko, mencias lin nur rilate rakontojn. Neniu raportas pri renkonto kun vivanta persono havanta tiun nomon. Dekomence li aperis nek kiel krimulo, nek kiel luktanto por libereco, sed kiel rolludanto en distraĵoj. La tuta “korpuso” de informoj pri li fontas el rakontoj kaj distraĵoj – ne el skribitaj protokoloj.

Ja ekzistas protokoloj pri similuloj, sed neniu el ili identiĝas kiel Robin Hood. Krome, la rakontoj ekzistas jam de longe; unue

deklamataj aŭ kantataj, poste kiel manuskriptoj. Nur ekde la 16-a jarcento aperis la unuaj presitaj baladoj. Poste eldoniĝis libroj, kies enhavo daŭre adaptiĝis al la aŭskultantaro, aŭ spektantaro, aŭ legantaro. Analoge, filmo farita nun pri la dua mondomilito malsimilas, tehniko kaj enhavo, al samtema filmo farita dum la 50-aj jaroj. Sammaniere la kantistoj-deklamistoj-rakontistoj ŝanĝis siajn rakontojn laŭ la siatempa aŭdantaro. Ankaŭ ili volis esti pagataj: gravas por ili distri, ne nutri per faktoj.

Por kompreni la rakontojn necesas ion scii pri kultura kaj historia fono. La mezepoko ne rekonis homajn rajtojn en la moderna senco. Socio estis piramido kun reĝo surpinte, helpataj aŭ malhelpataj de riĉaj granduloj: aristokratoj, klerikaro kaj, en la urboj, iuj metiistoj. Sube estis kamparanoj, kies tasko estis servi, kaj antaŭ ĉio nutri, la superulojn. Ili estis plejparte servutuloj kaj do ne rajtis translokiĝi.

Estis devige labori du aŭ tri tagojn semajne por vilaĝa bienulo ĉe ties tereno. Tiun sorton la kamparanoj akceptis – elekton ili ja ne havis – rezignacie, sed disputeme. Ankaŭ la riĉuloj

potencis, kaj laŭvole aplikis la potencon. Justeco ofte ne atingeblis, ĉar la leĝofarantoj estis koruptuloj. Bonŝanco aŭ malbonŝanco en la vivo hazardis. Validis sole la konsilo, ke ĉiu mem sin prizorgu.

Floris baladoj

Ree al la fontoj. La unua mencio de iu “Robin Hood” troviĝas en la alegoria poemo *La Vizio de Piers la Plugisto* de William Langland, el ĉirkaŭ 1377. Neglekta pastro nomita Pigreco diras:

**Mi ne konas perfekte mian
“Patro nia,” kiel la pastro ĝin
kantas,**

**Sed mi konas la versaĵojn pri
Robin Hood, kaj pri Ranulf grafo de
Ĉestro.**

Ankaŭ la verkisto Geoffrey Chaucer, en sia poemo *Troilo kaj Krisejdo*, 1380, aludas lin, tamen sen nomo, dum en vers-fragmento en manuskripto el ĉirkaŭ 1410, trovita en la katedralo de Linkolno, staras:

**Robin Hood en Sherwood staris,
jam sin kapuĉis, ĉapelis kaj
ŝtrumpis kaj ŝuis.**

Klare estas, ke tiam, fine de la 14-a jarcento, oni ekskribis kaj kopiis baladojn pri Robin Hood; sed tiuj estas skribitaj versioj de rakontoj jam buŝe konataj. Tiam la kornvala klerulo kaj estro de Queens College en Oksfordo, John

lom adaptita versio de la prelego farita dum la brita kongreso en Sheffield en 2014.

Trevisa, faris gravan ŝanĝon al la universitata instruprogramo pri beletro.

Ĝis tiam la precipaj beletraj lingvoj, krom la latina kaj antikva greka, estis la franca kaj la anglonormanda, ambaŭ pritraktataj kiel gepatraj lingvoj. Laŭ la ŝanĝoj enkondukitaj de Trevisa, ili iĝis fremdaj lingvoj; gepatra fariĝis nun la angla. Tiel malfermiĝis vaka spaco por verkistoj, en kiun venis novaj anglaj beletraĵoj. En tiu medio floris Langland, Chaucer kaj Mallory; floris krome baladoj, interalie tiuj pri Robin Hood.

La plej longa, kaj verŝajne plej malnova, el tiuj estis la *Eta gasto de Robin Hood kaj lia kompanio*. Ĝi konsistas el 456 kvarliniaj strofoj kaj enhavas kvin apartajn rakontojn: *Robin Hood kaj la kavaliro*, *Robin Hood kaj la ŝerifo*, *Eta Johano kaj la ŝerifo*, *Robin Hood kaj la reĝo* kaj *La morto de Robin Hood*. Tiu aperis en presita versio en 1508.

Surkovrile aperis bildo de rajdanto, ŝajne Robin Hood, sed la saman bildon oni jam uzis antaŭ 17 jaroj kiel ilustraĵon de la etbienulo de Chaucer. Ĉirkaŭ tiu jaro aperis aliloke la rakontoj *Robin Hood kaj*



Lignogravuraĵo sur paĝo 1 de la *Eta gasto de Robin Hood*, 1508

La situo de la scenejo

Problemo por modernaj esploristoj estas eltrovi, kie la eventoj okazis: ĉu en suda Jorkŝiro, aŭ en Nottingham kaj la arbaro Sherwood Forest?

Scenejo por la *Eta gasto* estas dekomence la arbaro de

Barnsdale, inter Wakefield kaj Doncaster en suda Jorkŝiro, iom norde de Sheffield. En kelkaj fontoj Robin foje nomiĝas “Robin el Loxley” – supozeble Locksley, vilaĝo apud samnoma rivereto kvin kilometrojn nordokcidente de la urbocentro de Sheffield.

Efektive Barnsdale situas nur 50 kilometrojn for de Sherwood.

Ĉasisto-ekskursoj povus konduki al

la potfaristo, Robin Hood kaj Gido de Gisborne kaj Robin Hood kaj la monaĥo. En tiuj verkoj la ceteraj roluloj estas: Eta Johano, Vilĉjo Rufulo, Multo Filo de la Muelisto, la Ŝerifo kaj Gido de Gisborne.

Pluraj al ni nun konataj figuroj mankas. La franciskano Tuck aperis unuafoje en teatraĵo en 1475. Franciskanoj venis al Anglujo nur en 1221, kaj al Nottingham nur en 1250. Mankas ankaŭ Mariano, tradicie la edzino de Robin. La nomo verŝajne fontas el franca teatraĵo *Robin et Marion* el ĉirkaŭ 1283, sed tiu estas tute alia rakonto kaj ne rilatas al la angla proskribito.

Kiam la franca rakonto prezentiĝis en Anglujo ĉe la printempaj majfestivaloj, ambaŭ nomoj kunfandiĝis kun la rakontoj pri Robin Hood – sed nur poste, iam inter 1450 kaj 1500. Ĉiuj aliaj roluloj aldoniĝis en la 16-a jarcento aŭ eĉ pli malfrue.



Barnsdale, do eblas pritrakti ambaŭ lokojn kiel partojn de pli granda sed ne tro vasta scenejo.

Rimarkeblas, ke, se temas pri Barnsdale, oni aludas precizajn lokojn. En *Robin Hood kaj la kavaliro*, necesas rajdi ĝis la abatejo de Sankta Maria en Jorko. En *La morto de Robin Hood*, la heroo mortas ĉe la priorejo de Kirklees. Se la scenejo estas Nottingham, mankas tiaj precizaj aludoj. Laŭ J. C. Holt (*Robin Hood – The Facts and the Fiction*: 1989), “ju pli Robin proksimiĝas al Nottingham, des pli neaŭtentika li iĝas”.

Tiuj plej fruaj rakontoj havas difinitajn komunajn ecojn: mal-amikeco kontraŭ la ŝerifo, klerikaro kaj kromaj riĉuloj; ŝtelĉasado de la reĝaj cervoj – grava delikto – en la arbaro de Sherwood kaj aliloke; facilanima perforto, ekzemple senkapigo aŭ kripligo de malamikoj; alivestado, aparte fare de Robin Hood mem; ĉeesto de potfaristo; kaj, malgraŭ la malamikeco kontraŭ riĉuloj, neflankiĝanta fideleco al la reĝo.

Ni jam konstatis, ke Robin Hood estas pli fikcia ol vera persono; sed la mezepoka aŭskultantaro ne volis aŭdi nur fikciojn. La rakontoj devis havi almenaŭ ŝajnan realan fonon, do rakontistoj prenis detalojn el la vivoj de veraj personoj. Tiel estis, ke la figuro de Robin Hood iĝis

mozaiko de diversaj homoj. Sed kiuj ili estis?

Mozaika figuro

La nomo mem malmulton diras. Ekde ĉirkaŭ 1250 “Robin Hood” estis kromnomo por ia krimuleto. Eble helpas, ke *Robin* similas al la angla *robbing* (rabado) kaj ke *hood* signifas *kapuĉo* – uzata por kaŝi la vizaĝon kaj resti nekonata.

Por trovi analogojn de Robin, endas serĉi inter rakontoj pri homoj kun aliaj nomoj, inkluzive de tiuj, kiuj dividas malmultajn komunajn ecojn kun li. Tia estas ekzemple Hereward la Gardema, 11-a angla ribelanto, kiu ne akceptis la regadon de la konkerantaj normandoj. Post eksterlanda sperto kiel dungosoldato, li kunlaboris en 1070 kun la danoj por kontraŭstari la normandojn. Poste li vivis kiel proskribito en orienta Anglujo, ĉirkaŭ la urbo Ely. En unu el la rakontoj, Hereward kaŝvizitas la tendaron de la normandoj – alivestita, kiel Robin, kiel potfaristo. Fine li, kiel Robin, ricevas pardonon.

Fulk la 3-a Fitzwarin troveblis inter la baronoj alfrontantaj al Reĝo Johano ĉe ekiĝo de la Granda Ĉarto de 1215. Li vivis kiel bandito kaj apud la kimra landlimo kaj en Wiltshire en Sudanglujo. En proza rakonto pri li aperas kamarado nomata Johano. Krome Fulk

alivestas sin kaj eskapas el la kaptado de la ŝerifo. Kiel Robin, li “ne faras iun damaĝon” al aliaj homoj. Li fondis priorejon en Albury, inter Shrewsbury kaj Kimrio – kiel Robin fondis priorejon en Barnsdale.

Malpli verŝajna fonto por la terĉirkaŭita Robin estas Eŭstako la Monaĥo – fakte ekde longe ne plu monaĥo, sed pirato kun bazo en la Markolaj Insuloj, el kie li kontraŭstaris la Reĝon Johanon. Rakonto pri li, *Wistasse Li Moine*, aperis iam inter 1223 kaj 1284. Laŭ tiu ankaŭ li alivestas sin, interalie kiel potfariston. Ankaŭ tie estas facilanima perforto – la lango de iu paĝio estas eltranĉita, por ke li restu silenta, kaj dum kvar el kvin soldatoj perdas la piedojn, la kvina devas iri al la mastro kaj klarigi, kial la kvar aliaj ne revenis. Eŭstako, kiel Robin, indulge pritraktas siajn kaptitojn, se ili diras la veron pri kiom da mono ili enpoŝe posedas.

Pli simila al Hereward ol al Robin estas la skota militĉefo kaj nacia heroo William Wallace. Rakontoj pri li tamen enhavas tiujn ecojn: li estas bonega pafarkisto, kontraŭstaras maljustecon el arbora kuŝejo, kaj alivestas sin kiel monaĥon – aŭ potfariston. Malsimilo inter Robin Hood kaj la supre menciitaj figuroj estas, ke neniu el ili estis, kiel li, etbienulo.

Ĉiuj estis relative riĉaj kaj politike potencaj.

Do konstateblas, ke malantaŭ la figuro de Robin Hood estas verŝajne pli ol unu vere ekzistanta persono. El la proksimumaj samnomoj konataj, la plej frua estas el Cirencester en sudokcidenta Anglujo, inter 1213 kaj 1216. Estis plua en Burthorpe en la graflando Durham en 1244. Tiuj estas tro longe for de nia regiono, kiel ankaŭ estas tuta rabistobando kun la nomo “Robinhood” aktiva en Berkshire en Sudanglujo.

Pli bona kandidato estas iu Robert el Wetherby, proskribito en orienta Jorkŝiro en 1255. Kromnomo lia estis “hobbehod”, kie *hod* estas kapuĉo, kaj *hobbe* ĉevaleto. Por la mezepoka vojrabisto, ĉevalo gravis same kiel la eskapaŭto por moderna bankrabisto. En la protokoloj de Wakefield, nur 15 kilometrojn for de Barnsdale, abundas robinhudoj.

Tiaj krimuloj plej ofte aperis en la protokoloj, kiam disrompado regis la landon – ekzemple dum la regado de la ĉiufanke malamata reĝo Johano, kaj meze de la 13-a jarcento dum interna milito inter reĝo Henriko III kaj baronoj sub Simono de Montfort. Post ties malsukceso kaj morto, multaj restis senteraj kaj malkontentaj.

Laŭ la historiisto David Baldwin, la sola persono, kiu iom similas al

la fikcia Robin Hood, estas iu Roger Godberd, etbienulo en Swannington, apud Coalville en Leicestershire. Godberd estas plurfoje arestita; ŝtelĉasis cervojn en la arbaro de Sherwood; atakis kaj prirabis abatejojn - en Leicestershire, kaj pli longe for en Wiltshire. Kiel Robin, kiu en la unua rakonto de la *Eta gasto* ŝirmas sin en la kavalira kastelo, ŝirmis sin Godberd ĉe Kavaliro Richard Foliot en lia kastelo Fenwick apud Barnsdale. Godberd, kiel Robin, havis kamaradon - iun Walter Devyas, kiu akompanis lin ĝis lia morto en 1272. Fine en 1276 Godberd ricevis pardonon - eble de la reĝo, kiel Robin - kaj laŭ nia scio ankaŭ enlite mortis. Tamen mankas indiko, ke oni uzis por Godberd la nomon "Robin Hood". Ĉu estis li la "vera Robin Hood"? Ni ankoraŭ ne scias.

Infanamika heroo

Ĝis nun ni pritraktis tiun heroon kiel mezepokulon. Nuntempe oni konas lin plejparte kiel figuron el la distra industrio - el infanlibroj, infanteatraĵoj, filmoj kaj televidaj elsendoj. La du homtipoj malsimilas. Kiel perforta krimuleto iĝis infanamika heroo? Kio okazis al li dum la jarcentoj, kiuj apartigas nin de mezepoko?

Por la Robin de la *Eta gasto* elirpunkto estis la reguloj kaj kutimoj de la tiama socio. Li ne

celis ŝanĝi la socion, strebante nur al malavareco, pieco - li estas fervorulo de la Sankta Maria - kaj ĝentileco.

Dum la 16-a jarcento aperis unuaj presitaj versioj de la legendo: samtempe Robin, antaŭe nur etbienulo, iĝis nobelulo. Pro la influo de la printempaj majfestoj ekaperis Mariono, kaj kun ŝi ia alhejmiĝo de la legendo, kun rilata malemfazo de krimeco kaj perforto. Tiam ĝi ankaŭ fiksiĝis en la 1190-aj jaroj, do la regado de Rikardo la 1-a, kvankam la fontoj indikas pli malfruan daton. En la *Eta gasto* la nomo de la reĝo estas ne Rikardo, sed Eduardo.

Vaste influis la nuntempan Robin Hood la romano *Ivanhoe* de Walter Scott. Tie li iĝas anglo, luktante kontraŭ la normandoj, do kvazaŭ arbara versio de Hereward la Gardema. Tiu profilo, kune kun la emo admiri la vikingojn, estis eco de nova perspektivo pri historio, pli taŭga por la epoko de la brita imperio.

Al tiu apartenas ankaŭ la unuaj adaptiĝoj de la rakontoj por infanoj, ĉe kiuj Robin iĝas filantropo. Li ne nur ŝtelis de riĉuloj, sed ankaŭ helpis al malriĉuloj. Tiu eco aperis nur tiam, kaj do estas sufiĉe moderna.

En la nuntempo imponas ne nur la disvastiĝo de la legendo per infanlibroj, inkluzive de bildlibroj

kaj grafikajoj, sed ankaŭ la rolo de filmoj kaj televido. La unua filmo de Robin Hood aperis en 1908. Pli konata estas tiu de 1922 kun Douglas Fairbanks (en la du fotoj). Ambaŭ estis kompreneble senŝonaj.

La definitiva versio por amaspektantaro estis, en 1938, *La aventuroj de Robin Hood* kun Errol Flynn kaj Olivia de Havilland. Sekvis televida serio de 1955 ĝis 1959 kun la aktoro Richard Greene. Ĝi enhavis multajn tute novajn rakontojn, ankaŭ okazintajn fine de la 12-a jarcento.

Ekde la 1980-aj jaroj aliĝas islamano al la kompanio, supozeble por ke la legendo alparolu plurkulturan spektantaron. Tio okazis unue ĉe *Robin of Sherwood* en 1984, kaj denove en *Robin Hood – Princo de Ŝtelistoj* en 1991, tamen ne en la plej lasta versio *Robin Hood* (kun Russell Crowe) en 2010. Tiu lasta versio koncernas precipe la lukton kontraŭ la kanajla reĝo Johano kaj francaj invadintoj.

Malmulte da malnovaj nomoj por la kompanio restas en la rolantaro. Evidentiĝas, ke modernaj verkistoj – kaj filmfaristoj – adaptis sin al la spektantaro, kiel antaŭe faris la kantistoj-rakontistoj de la mezepoko kaj de sekvaj jarcentoj.

Esplorante tiun temon mi dekomence supozis, ke Robin Hood estas nur angla fenomeno. Jen granda eraro mia. Mi konstatis, ke

krimuloj-herooj aperas en aro da landoj, en kaj ekster Eŭropo. Jen nur dek:

el Germanujo: Schinderhannes, kromnomoj de Johannes Büchler; prirabinte homojn ambaŭflanke de rivero Rejno, kiu publike senkapiĝis en Majenco;

el Slovakio: Juraj Janošík, kiu fine de la 17-a jarcento prirabis nobelulojn kaj – vere – helpis al malriĉuloj. Artikolo pri li aperis lastatempe en *Monato*;

el Litovio: Tadas Blinda, arbarloĝanto kaj proskribito el la 19-a jarcento;

el Estonio: Rummu Jüri, ŝtelisto, rabisto kaj poplheroo, 1856–1894;

el Romanio: la valaĥo Iancu Jianu, proskribito kaj tiel nomata hajduko (batalanto por socia justeco);

el Ukrainio: Ustym Karmaliuk, 1787–1835, popolheroo kaj ĉefo de gerilanoj;

el Meksiko: Chucho el Roto, kromnomo de Jesús Arriega, bandito, 1858–1885;

el Koreio: Im Kkokjong, ĉefo de kamparaj ribelantoj kontraŭ impostoj inter 1559 kaj 1562;

el Japanio: Nezumu, kromnomo por Namakura Jirokichi, ŝtelisto kaj popola heroo. Tuj antaŭ ol esti arestita, li divorcis siajn edzinojn (mi ne scias kiom da), por ke ankaŭ ili ne estu punitaj pro liaj krimoj.

Ankaŭ tiuj figuroj havas komunajn ecojn. Ili mortis junaj, aŭ havis kromnomojn, kiuj indikas popolan aprobon, ĉu ili luktis por homoj, kiel Iancu Jianu, ĉu nur por si mem, kiel Schinderhannes. Ŝajne la plimulto de tiuj kvazaŭ-robinhudoj faris la duan, prirabante ne nur riĉulojn sed ankaŭ homojn ĝenerale.

Socia banditado

Tamen, se ankaŭ la popolo tiel viktimiĝis, kial oni pretis tiujn “banditojn” subteni? Por respondi al tiu demando necesas pritrakti ĝin kontraŭ pli vasta fono. Tion faris la lastatempe mortinta brita historiisto Eric Hobsbawm, kiu en 1959 por la unua fojo uzis la terminon “socia banditado”. Laŭ li, sociaj banditoj estas “proskribitaj kamparanoj, pritraktataj de la estro kaj ŝtato kiel krimuloj, sed kiuj restas ene de la kamparana socio, kaj kiujn la popolo estimas kiel heroojn, ĉampionojn, venĝantojn, luktantojn por justeco, eble eĉ kiel ĉefojn de libereco, kaj ĉiuokaze homojn mirindajn, helpindajn kaj subtenindajn”.

Do, por historiisto, socia bandito ne estas simple iu ajn krimulo. Tiu reprezentas fendon en la socio aperantan, kiam registaro pretendas efektiviĝi leĝaron tra la tuta lando, sed ne kapablas tion plenumi. Samtempe okazas ŝanĝoj



en traktado de rajtoj je tero kaj kultivado. La koncepto ebligas al historiistoj kompari kriman agadon en malsimilaj landoj.

Tiel ĝi emfazas ankaŭ kernajn demandojn malantaŭ terorismo. Konsciaj pri tiuj, oni pli bone povos ilin respondi kaj tiel forigi la impulsojn malantaŭ terorismaj movadoj.

De proskribito el la 13-a jarcento ĝis terorismo en la 21-a: jen longa vojaĝo. Enigma restas la identeco de nia heroo: enigma ankaŭ la medio, en kiu vivas tiaj homoj – riskemuloj, kolrompuloj, piedpinte marŝante inter du mondoj laŭ la rokoj de tiu socia fendo.

Robin Hood estis la unua, pri kiu ni estas laŭnome informitaj, sed certe ni ne vidis la lastan. ■

MIA ALVENO en Pekino okazis en oktobro 1981 nur kelkajn jarojn post la fino de la tiel nomata “Kultura Revolucio”, kiu kaŭzis ĉirkaŭ dek jarojn da tumultoj kaj kruelaĵoj. Ĝus ekrevenis eksterlandanoj en Ĉinion. Estas eble kompreni, ke mi ne emis tro demandi pri politikaj aferoj, sed mi volonte lasis al homoj rakonti siajn historiojn, se ili deziris tion fari. Pluraj aprezis fremdan orelon. Oni ne malofte persekutis homojn nur pro tio, ke ili havas eksterlandajn kontaktojn. En tiaj kondiĉoj ĉiam suferas esperantistoj.

Oficisto de Ĉina Esperanto-Ligo rakontis, ke Ruĝaj Gvardianoj malebligis al li dum noktoj dormi, dum oni pridemandadis lin pro supozitaj “krimoj”, kiel ekzemple spionado por eksterlando. Tian sensencan suferadon mi ne facile imagis al mi. Mi estis des pli

respektema al tiuj homoj, ĉar ili jes pretis rakonti, kvankam ili tiam ne povis scii, ĉu la nova, pli malferma politiko pludaŭros. Kvankam esperantistoj suferadis, silentis aŭ laŭlitere sekvis instrukciojn desuprajn, tamen estis la rakontoj de usonanino neesperantista, kiuj plej gravuriĝis en mian menson.

La korto de la Fremdlingva Eldonejo estis granda, nenova, eble de la 1920-aj jaroj – kaj tipe ĉina oficiala konstruaĵo de tiu epoko. Tie troviĝis redaktejoj de gazetoj en multegaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Tie same troviĝis la oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo, kvankam sur la teretaĝo, kun elrigardo en la korton kaj vid-alvide al la rubejo! Apude, supre, estis mia loĝĉambro. Fremdlingvaj subredaktoroj ŝajne loĝadis iuhotele, sed ne mi. Apud mi loĝis ĉinaj familioj, sed ne sole ĉinoj. Inter ili loĝadis tie



ankaŭ kelkaj mezaĝaj usonaninoj.
Mi nenion sciis pri ili.

Iun tagon oni peris al mi peton.
Ĉu mi ŝatus viziti usonaninon por
babili angle? Ŝi ŝatus renkonti min.
Mi kompreneble scivolis, do
konsentis. Post tiel longa tempo mi
ne facile memoras, pri kio ni
babiladis en ŝia ĉambraro, sed ŝi
kaj unu-du aliaj edziniĝis kun ĉinoj
dum la 1920-aj aŭ '30-aj jaroj. Pro
tio ili iĝis ĉinaj civitanoj. La sorto
diktis, ke ili travivis tempon de
granda socia malstabileco,
enlandan militadon, revolucion,
pliajn renversiĝojn, des pli
malfacilajn kiam mortis la edzo.

Ŝi havis du gefilojn, kiuj tamen
sukcesis reiri al Usono. Ili bone
fartas. Mi demandis, ĉu ŝi ne volus
reiri al Usono. "Nenion plu mi
havas tie," ŝi respondis. Ŝi jam
alkutimiĝis. Spite al ĉiaj problemoj
kaj malgraŭ la malriĉeco ŝi ŝajne
sukcesis travivi en maniero pli-
malpli kontentiga al si.

Kvankam ŝi nun loĝis preskaŭ
sola, pliaj similsortulinoj loĝis
tiukorte. La destino de alia
usonanino estis malpli bona. Mi
jam foje rimarkis ŝin vagadi tra la
korto. Ŝi ne estis grizhara, kiel oni
eble atendus de tiuaĝa virino, sed ŝi
estis tute blankhara. Ŝia hararo
estis des pli elstara por mi, ĉar ĉina
oficisto komentis pri ĝi: "Ho, kiel
bela!" Mi ne respondis al li. Mi sciis
pli bone. Tiu estis nek la blond-

hareco de belo, nek la blankhareco
de maljunaĝo.

Estas kutimo ĉe multaj ĉinoj
imagi, ke ĉiu nenigra hararo estas
bela. Ja ni eŭropdevenuloj ofte
opinias blondulinojn kaj ruĝharul-
inojn pli belaj. Tio, kio ne kutimas,
estas ekzotika, kaj tial pli havinda.

La hararo de tiu virino estis
blanka pro hororo.

Iun vesperiĝon mi aŭdis
tumulton de ekstere. Mi eliris por
rigardi, kio okazas. La blank-
harulino staris alte supre sur la
tegmento de la kvaretaĝa
konstruaĵo kaj laŭte kriadis. Homoj
malsupre ĉirkaŭis, provante
trankviligi ŝin. Ŝi kriis, ke ŝi celas
sin mortigi, ĉar por ŝi jam delonge
ne plu restas kialo pluvivi. Post iom
da tempo oni tamen sukcesis savi
ŝin kaj ŝin forkondukis.

Ankaŭ ŝi edziniĝis kun ĉino. Ŝi
havis filon, kaj poste la edzo
mortis. La filo iĝis daŭra celo de
fiatakoj dum la Kultura Revolucio
pro sia duoneksterlandaneco,
kredeble ankaŭ pro pura rasismo.
Fine, li ne plu povis elteni kaj
mortigis sin.

Ratoj rapidis ĉirkaŭ la angulon
de la korto. ■

Geoffrey Sutton estas konata
esperantisto, kiu interalie kompilis la
anglalingvan *Concise Encyclopedia of
the Original Literature of Esperanto*.

AMASKOMUNIKILOJ pritraktas Ruslandon, kaj ankaŭ ĝenerale aliajn landojn, de supre malsupren. Alivorte, ili informas pri prezidantoj, pri registaraj decidoj, kaj malofte pri la popoloj mem – krom se temas pri katastrofoj, ĉu naturaj, ĉu homaj. Popolo suferanta, ekzemple pro malsato, malsano, aŭ pro konflikto, milito, nutras filmkameraojn kaj novaĵelsendojn kiel ujo/io-disputo esperantistojn. Do eĉ en epoko de tujfilmado, tujraportado, malmultas informoj pri ordinaruloj.

Jen la atuto de la libro de la esperanta ĵurnalisto finna kaj interalie fakulo pri Ruslando Kalle Kniivilä. Li pritraktas aferojn de malsupre supren kaj, per intervjuoj



Recenzo Kalle Kniivilä. *Homoj de Putin – La silenta plimulto de Rusio*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2014. 188 paĝoj. ISBN 9789077 068522.

kun ordinaraj rusoj, respondas fundan demandon, kial la popolo subtenas Putin – ulon pentratan de okcidentaj amaskomunikiloj kutime kiel ogron.

Eblas resumi tiel la respondon: antaŭ Putin, ĉio kolapsis (ekonomio, salajroj, labor-ebloj, ktp); post Putin, ĉio boniĝis kaj, super ĉio, stabiliĝis. Jen unu el la intervjuatoj: “... Irina donis al Putin la meriton pri ĉio bona, kio okazis en Rusio post la disfalo de Sovetio ... la perestrojko de Gorbaĉov kaj la jardeko de Jelcin ĉe la potenco iĝis kunplektita periodo de malordo ...” (p. 96).

Tamen jen la vunda punkto de la libro. Efektive temas pri unusola demando kun unusola respondo. Honeste, meze de la libro, mi ekenuis: mi jam legis demandon kaj respondon, demandon kaj respondon, kaj kredis – eble erare, sed posta pluklegado fortigis mian impreson – ke malestis io nova por lerni, por surprizi. Mi emas do diri, ke la libro tro longas: ne necesas

tiom da intervjuoj, tiom da vizitoj ĉe tiom da familioj, por respondi la bazan demandon.

Domaĝe, ĉar la libro estas modele verkita, en flua, facile digestebla lingvo (kaj por helpi gluti la enhavon la ĉapitroj ĝenerale mallongas). Estus pluso, mi kredas, ornamu la libron per fotoj: ekzemple por kompari sovet-epokajn aparta-

mentojn kun nunaj – eĉ por vidi la vizaĝojn de intervjuatoj.

Malgraŭ longeco, mi rekomendas la libron. Ĝi prezentas freŝan, nekutiman bildon pri ordinaraĵoj – homoj ofte neglektataj en raportoj amas-komunikilaj – loĝantaj en granda, grava kaj de pluraj vidpunktoj enigma lando. ■

Traduku!

Jen la rezulto de la traduk-konkurso anoncita en la antaŭlasta numero de *La Brita Esperantisto*.

LA ANGLALINGVA versio, kiu aperas post la originala poemo en la venonta paĝaro, estas verkita de Donald Scott, el nord-orienta Anglujo. Decidite estas ne aljuĝi premion (temas nur pri la “gloro” legi la propran nomon en *La Brita Esperantisto*), ĉar, kiel atentigis la juĝinto de la traduko-konkurso, la poemo de s-ro Scott ne povas esti rigardata kiel traduko sed kiel memstara verko inspirita de la auld-a originalo.

Kiel notis s-ro Scott mem, sendante la tradukon, malfacilas redoni la “ebriecon” de la poemo. Eble pro tio nur du homoj provis traduki – fakte s-ro Scott per du provoj, la dua iomete interpunkcie pli libera.

La juĝinto demandis sin, kiel la tradukinto ŝanĝis la titolon en la

versio, kiu kaptis la spiriton de la originalo sed ne la formon kaj la lingvon de la originalo. Tamen la tradukinto, laŭ la opinio de la juĝinto, nepre ne rezignu pri tradukado – tamen pli zorge atentu la originalan tekston. ■

Kiel supre notite, nur du homoj konkursis. Malmulte da intereso vekis ankaŭ antaŭaj konkursoj (maksimume iam kvar konkursaĵoj). Konkludendas, aŭ ke la tekstoj tro malfacilis, kio malinstigis al konkursado, aŭ ke mankas emo inter britaj esperantistoj entrepreni ekzercojn tiajn. Aŭ eble ambaŭ.

Ĉiaokaze la redakcio de *La Brita Esperantisto* decidis nuligi la rubrikon. Al kuraĝaj konkursintoj kaj al la juĝinto ni dankas.

Ebrio

la boteloj staras vice,
kamarade kaj komplice
sur la altaj murobretoj –
botelegoj, boteletoj,
verdaj, flavaj,
grasaj, kavaj,
palpebrume en la lumo
min invitas al konsumo,
gluta, tuta,
ĉes-refuta
forkonsumo de l' enhavo,
de la verdo, de la flavo,
de likvoro glate glita
svate ŝvita
kvate kvita
strate strita
streta
struta

mi rimarkas: en angulo
sidas ia ina ulo
kiu ridas ĉevaldente
kaj rikanas sento-tente,
sin ekmovas,
kison blovas,
krurojn ŝovas:
kaj mi povas
super ŝtrumpo vidi blankon,
sangomankan
gamboflankon.
mi vin amas, bela ino,
mi adoras vin sen limo,

volas tuŝi,
kune kuŝi,
kaj karesi,
kaj forgesi,
pri la griza ver' forgesi
grila priva vorgeresi
vira vorga pivaresi
vipareŝi
mi neŝeŝi
neŝeŝi
ŝuvi puvi pova-povaŝ
diri kie ŝiŝ ŝin trovaŝ
la ne
la ne-ŝe
ne-ŝeŝ
ŝeŝ
dako danto danko dankon
dankon
padonu mineŝtaŝ bria
padon'
padon'
'kon
'kon

paŭzo
naŭzo



Lined in welcoming collusion
On the shelves behind the bar
Stand the bottles in profusion
Like the good old pals they are.
Big ones, small ones,
Green and yellow,
Wink and whisper,
“Well met, fellow”.
Greasy, sticky,
Slurpy, licky,
Luscious in the evening light,
Every bottle seeks its punter.
Bottle-icious is the sight.
Glugging down the glorious liquor
I begin to live my dreams.
Green or yellow,
Brown or tawny,
Nothing is quite what it seems.
Even though I know I shouldn't,
Necking down each precious drop,
Something ostrich-like inside me
Tells me I'm not gonna stop.
And the liquor,
Smoothly slipping,
Sweetly dripping,
Spittle spewing,
Sweater slopping,
Trousers staining,
Bladder sluicing,
Splashy pissing,
Shplashy shplishing ...

Now I notice in a corner
Sits a horny piece of fluff
And the horsey grin she gives me
Asks if I can do my stuff.
Kisses blowing,
White thigh showing,
Stocking sliding
To the knee.
All this tells me
This dame's willing
For an alcoholic filling
And I sup again in glee.
Turn me on,
You little treasure.
I want you
For every pleasure.
Touching,
Smooching,
Licking,
Snogging,
Necking,
Sucking, yes
And even ...
Let's just say...

Forgetting ...

Forget about this slimy life,
Forget about the hate and strife,
Forgerrabout the toxic wife,
Forgerrabout ... oh hell!
What was it
I was gonna tell?



- A: Halo?
- B: (*silento*)
- A: Halo? Ĉu mi parolas kun la kamentubisto?
- B: Kio? Mi ne povas aŭdi ... terura signalo. Kion vi diris?
- A: Ĉu vi estas la kamentubisto?
- B: Kamelisto? Jes, mi estas kamelisto - kion vi volas?
- A: Mi volas, ke vi purigu miajn kamentubojn.
- B: Vi volas kion? Ke mi purigu la hufojn de viaj kameloj?
- A: (*pli laŭte*) La tubojn de miaj kamenoj - jes, ĉu vi povos fari?
- B: Nu, mi purigas kutime nur la proprajn kamelojn, sed mi supozas, ke mi povos fari escepton.
- A: Ĉu vi estas plene kvalifikita kamentubisto? Vi sonas iom ... nu ...
- B: Infektita kamelisto mi certe ne estas. Kia insulto!
- A: Ho ne, ne, mi volas nur scii, kiom da jaroj vi laboras kiel ...
- B: Ne estas via afero, kiom da haroj mi havas.
- A: Do ... sperta. Ĉu vi estas ja sperta?
- B: Certa? Pri tio?
- A: (*laŭte*) Sperta! Ho, ne gravas ... ĉu vi povos veni por ilin purigi, aŭ ne?

Malofte en la paĝoj de *La Brita Esperantisto* ni prezentas skeĉon. Jen amuza specimeno, kiu eble inspiros aliajn samĝenre verki.

- B: Nu, mi supozas. Kiom da kameloj?
- A: Du kamenojn mi havas - unu en la manĝoĉambro kaj alia en la salono.
- B: La salono?
- A: Jes.
- B: En la domo?
- A: Nu jes. Kie kutime troveblas kamenoj? Hej ... ĉu vi estas certa, ke vi estas specialisto?
- B: Sperta? Mi? Oni taksas min la plej elstara specialisto pri kameloj en la tuta Omana dezerto.
- A: Kio? Ĉu Omanon vi diris? Sed mi loĝas en Obano ... en Skotlando.
- B: Skotlando? Do ... ĉu vi ne povas trovi specialiston pli apudan?
- A: Momenton. Mi kredas, ke mi mistelefonis.
- B: Jes ... ĉar ŝajnas al mi, ke vi mistifikas. Neniam mi aŭdis pri kameloj en Skotlando.
- A: Mi ege bedaŭras, ke mi ĝenis vin, sinjoro.
- B: (*ridante*) Ho, tute ne gravas: mi antaŭĝuas diri al mia

edzino, ke
mi parolis
hodiaŭ kun
skotino.

A: Kaj mi same
ĝojas, ke
eblis al mi
paroli kun
kamelisto
en Omano.
Ĉi tiuj
poŝtelefonoj
estas ja
mirindaj, ĉu
ne?

B: Jes, ja ...
se haveblas
bona
signalo.
(ambaŭ
ridas) ■



And now I know
I need to go.
I'm sorry
But I must,
Or else I'll bust.

Yet what, for me,
Can now be sadder
Than leaving you,
Just to relieve
My bladder?
An' so, yer see
I gotta pee.

Don' even think
I canna hold a drink.

Jus' so yer know,
I gotta go.
Sorry,
Shorry,
Sho very shorry...

He stands up.
And he throws up. ■

FORFIKULOJ dumnokte manĝas, kaj ĉe sunleviĝo kaŝas sin en mallumaj lokoj. Tio ne inkluzivas vian orelon, laŭ folkloro rakonto. Ili vere ne volas enrampi kaj bori truon en vian cerbon por demeti ovojn. Tio estas tuta sensencaĵo. Tamen en multaj eŭropaj lingvoj oni krom-nomas forfikulon “orelborilo”, aŭ io simila.


Kial, do, oni dezirus kapti forfikulojn? Nu, maĉante, ili truigas petalojn, kiuj malbeligas florojn por vendi aŭ ekspozicii. Ili difektas foje ankaŭ komercajn rikoltojn.

Se vi provos teni forfikulon en via pugno, ĝi baldaŭ eskapos. La korpo estas plata kaj polurita, kiu permesas al ĝi kunpremi sin inter viaj fingroj kaj fali al la grundo. Ĝi ne provos forflugi. Forfikulo ja

havas delikatajn flugilojn, sed ili estas malfacile refaldeblaj post flugo – kvazaŭ komplika ombrelo, kiu rifuzas reiri en kovrilon – do ili ne ĝenas sin per malfaldiĝo.

Se unu el tiuj insektoj subite falus el florbukedo, aŭ ekaperus en laktuko, vi verŝajne ne restus sufiĉe trankvila por ekzameni la etulon. Se vi farus, vi rimarkus, ke ĝi posedas kapon, kun okuloj, mandibloj kaj longaj flekseblaj antenoj, mezan parton (torakon), de kiu kreskas ses kruroj, kaj voston parton (abdomenon), al kiu estas fiksitaj du pinĉiloj.

Pinĉiloj de la virforfikulo estas kurbitaj kaj ilin ĝi uzas por lukti kun aliaj viraj samspecianoj. Tiuj de la ino estas rektaj.



Ambaŭ uzas ilin por kapti predojn kaj por faldi la flugilojn. La flugilojn vi ne rimarkos, ĉar ili estas nete falditaj sub malmolaj kovriloj, kio rezultas en flulinia korpo.

Forfikuloj estas iagrade utilaj en ĝardenoj kaj kampoj. Ili manĝas multajn afidojn, insektojn kaj araneojn, kaj putriĝantaj best- kaj plant-restaĵojn.

Ili pariĝas en aŭtuno. Ili restas kune dum la malvarmaj monatoj en kaveto sub la grundo aŭ sub falintaj folioj aŭ sub arboŝelo. Fruprintempe, la femalo forigas la masklon kaj demetas siajn ovojn. Tiujn ŝi prizorgos, ilin daŭre turnante kaj purigante kontraŭ ŝimo. Ŝi helpas ankaŭ dum elkoviĝo. Tio estas nekutima konduto inter ne-sociaj insektoj.

El la ovoj elrampas palaj etetaj kopioj de la patrino - nimfoj - kiuj kaŝas sin sub la patrino. Unue ili voras propran ovoŝelon, poste nutraĵon resputitan de la patrino. Nimfoj devus perdi sian haŭton de tempo al tempo por pligrandiĝi. La patrino prizorgas ilin ĝis la dua haŭtoŝanĝo en julio. Post kvin aŭ ses haŭtoŝanĝiĝoj la forfikuloj estas maturaj.

Spite de sia feroca aspekto, forfikuloj estas tute sendanĝeraj - ili povas nur pinĉeti. Ili estas tre puraj kaj nur hazarde eniras



domojn. Malsanon ili transdonas nek al homo nek al besto. Sed tiu, kiu trovas forfikulo-neston, eble konfuzas kun blatoj. Ja ekzistas ligo inter la du specioj, kiu tamen datumas de la erao, antaŭ ol dinosaŭroj vagis sur la tero.

Mi taksas forfikulojn tute ĉarmaj! ■

La angla en Barato ...

Mi dankas al **Edmund Grimley Evans**, kiu atentigis pri artikolo en *New York Review of Books* (*The Week*: 2014-07-05) pri la malgraviĝo de la angla lingvo en Barato.



Ŝajnas, ke la ĉefministro, Narendra Modi (fotita), malofte uzas la anglan, preferante indiĝenajn lingvojn, ĉar li ne regas la “altklasan, rafinitan anglan” de tradicia elito. Krome, naciaj gazetoj lastatempe lanĉis eldonojn en indiĝenaj lingvoj. Konkludas la artikolo, ke en Barato la angla “ne plu konsideratas kiel nepra pasporto al sukceso”.

Notindis, cetere, ke kiam Modi vizitis Novjorkon kaj faris festparoladon ĉe Madison Square

Gardens, li uzis ne la anglan sed la hindan (*The Guardian*: 2014-09-29).

Kaj en Ugando ...

Aperis en *The Guardian* (2014-12-22) artikolo pri la angla uzata en Ugando. Kiel en multaj partoj de la mondo, kie la angla parolatas kiel dua aŭ tria lingvo, aŭdeblas diversaj – almenaŭ al britaj oreloj – strangaĵoj, tiel ke esploristo, Bernard Sabiti, epitetas la ugandan anglan *Uglish*.

Ekzemploj: *benching* – kiam oni vizitas homon, kiu romantike interesas; *buffalo* – iu, kiu malelegante uzas la anglan; *bullet* – antaŭviditaj ekzameno-demandoj; *side dish* – eksteredza amatino; *vacist* – ferianta studento. Laŭ Sabiti, kreskas Uglish pro falanta eduka nivelo kaj pro manko de kontakto kun denaskaj parolantoj de la angla. Ibesp.org/uglish

Esperanto en la radio

Danke al **Vilĉjo Walker** aŭdiĝis esperantaj frazoj en BBC-podkasto *The Information Age* dissendita 2014-10-28. Vilĉjo reagis al mencio pri la internacia lingvo dissendita du semajnojn antaŭe, kiam oni provis traduki esperanten la frazon “We nailed this puppy to the wall”.

Nu, jes ... vi ne estas la sola, kiu ne kaptas ties evidente profundan signifon.

Gratulojn ...

... al **d-ino Angela Tellier**,

kiu en decembro sukcese defendis sian doktoriĝan disertacion ĉe Universtato de Essex. La titolo: "Metalinguistic awareness and foreign language learning in primary school: A classroom study with children aged 8 to 9 years".

... kaj al **Viv O'Dunne**, dojeno de la EAB-oficejo en Barlastono, kiu en januaro fariĝis avino.

Bona novaĵo!

Tiu, kiu lernas fremdan lingvon, larĝigas sian cerbon, laŭ esploroj faritaj en Svedujo. Ne gravas, ŝajne, kiam oni eklernas, ĉu jun-, ĉu maljun-aĝe. Cetere pli larĝa cerbo povas pozitive efiki kontraŭ malsanoj kiel alchejmero, opinias profesoro Alison Mackey (universitatoj de Georgetown kaj Lancaster), kiu priraportis la esplorojn en *The Guardian* (2014-09-04). La konkludoj estis verŝajne jam konataj al esperantistoj ...

lbesp.org/alison-mackey

Dankon al ...

... **Edmund Grimley Evans**, kiu raportis, ke televida programo *Homes under the Hammer* (BBC1: 2014-10-28) informis mallonge pri la

trinkejo *La Verda Stelo* kaj la stratoj Esperanto Way kaj Zamenhof Grove en Stoke-on-Trent. Tostis la anoncis-to al la internacia lingvo, dirante - kredeble - "Sanon!"

Kaj al ...

... **Hilary Chapman**, kiu trovis artikolon en *The Telegraph* (2014-09-19) pri "Galerie kreo" (tiel). La kunfondinto de la artgalerio, Clémence Krzentowski, prenis esperantan vorton, "ĉar ni serĉis mallongan nomon ajnlingve kompreneblan". La galerio funkcias, laŭ Krzentowski, kvazaŭ eslorejo por desegnistoj.

lbesp.org/galerie-kreo

Konkursu!

Bulgara Esperanto-Asocio anoncis literaturan konkurson kun tri branĉoj: poezio (maksimume du poemoj), prozo (ĝis kvarpaĝa novelo) kaj eseo (temo ne indikita). La verkoj estu originale verkitaj en Esperanto kaj la limdato por konkursi falas fine de la jaro.

Pliaj detaloj: modest@abv.bg

Kondolencojn ...

... al la familio de **Jim Lawson**, kiu mortis pasintan septembron je aĝo de 88 jaroj. Jim fidele ĉeestis kunvenojn de la Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio kaj partoprenis plurajn somerajn eventojn en Barlastono kaj Shallowford. ■



Partoprenantoj de la oktobra drondo-sesio en Londono:

Peter Redfarn, Joyce Bunting, Anica Page, Tim Owen, Neil Roberts, Clare Hunter, Mikaelo Sims,
Marteno Miniñ, Tim Morley, David King, Mark Palmer, Anna Powell, Terry Page.